

& Infanoj ĉe montrofenestro:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 282 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:47> (/doododo dodo mimi dodo reTi; do TiTi dore mido TiLa SooSo;So dodo dodo mimi dodo reeTi;Ti dodo TiTi dore mido Ti Ti;

(#Rekantaĵe: dodo TiTi doTi LaSo; mi rere miimifa somi fa mi; la lala soso fafa sofa mi mi; fa mi; dodo TiTi doTi La So o)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 /Montrofenestron miras du infanoj. ;
Malriĉaj. Knab', knabino. Ĉe ŝi: pupo. ;
Mizera pup'. El ĉifonaĵ' kaj stupo ;
Farita fuŝe per mallertaj manoj.

(×: **Forto kreskas, adoleskas, ; fariĝas
granda rustika arbo ; Kiel ni semas,
tiel ni rikoltos ; florojn ; Forto
kreskas, adoleskas.**)

'2 Al vitro gape ili premapogas ; La
nazojn. Aŭto, urso, lulĉevalo, ; Armeo
plumba, pup' kun silkvualo: ;
Ludilmirakloj tie ilin logas.

'3 Kaj plezurante pri l' senpaga festo, ;
Faligas ŝi la pupon, dum ŝi revas. ; Kaj
ŝi surpaŝas. Pupohaŭto krevas. ; Tra l'
vund' elŝovas sin la stup-intesto.

'4 Nun ŝi rimarkas. Staras en konfuzo. ;
Ekploras. Levas ŝi la pupon mole. ; Al
brusto premas, lulas ĝin konsole, ;
Viŝante siajn larmojn per la bluzo.

'5 La knab' pli aĝa, kun mallerta peno ;
Konsolas ŝin, sed ne efikas multe. ; Pli
kaj pli larmas, ploras ŝi singulte, ; Jam
ili falis el infan-edeno.

'6 Kaj nun, transvitren, al infan-ĉielo, ;
Rigardas li kun brakoj krucmetitaj, ;
Senpove, mute, kun okuloj spitaj, ; Kiel
simbolo eta de l' Ribelo.)